

La ora Ŝlosileto.

La suno, malrapide, malaperis; la konfuza senlumeco estis anstataŭinta la taglumon; dolĉa muziko de malproksima sonorilaro, agrablege lulis min; miaj palpebroj plipeziĝis, kaj fine mi ekdormis.

Ho, kia mirinda vidaĵo tiam prezentigas al mi. — Delikate portata per blankajflugiloj, alvenas ravega feino; oraj bukloj ĉirkaŭas ŝian belegan vizaĝon; blanka, diafana vualo, kovras ŝian gracian korpon; kaj kiel nuboj, ŝi forflugis. — Longe mi restis kun tiu ĉi kortuŝanta impresio; de longa tempo la mistera feino jam malaperis, kiam mi ankoraŭ estas ŝin serĉanta per rigardo. — Ho, mi volus eterne ŝin sekvi!

Igante pli kvietaj, mi ekvidas, apud mi, verdan kesteton; ĉiulanke mi ĝin turnas, por eltrovi la seruron; fine mi ekvidas, en angulo, malgrandan risorton, kiun mi premas. — Tuj la kesteto malfermiĝas, kaj mi elprenas el ĝi oran ŝlosileton.

Apenaŭ mi ĝin ekprenis, kiam disigigas parfuma roz-arbetaro, vidigante al mia mirigata rigardo, ĉielan anĝeleton; preskaŭ ne tertuŝante, li pli proksimiĝas, kaj prenante mian manon, li dolĉe min fortiras. Nekonscia, mi lin sekvas, kaj baldaŭ ni alvenas antaŭ grandan feran pordegon ornamitan per du kolosaj ŝtonaj leonoj; instinkte mi provas uzi la ŝlosileton, kaj, ho miraklo! la pordego malfermiĝas, kaj tuj mi estas ĉarmita per admirenda vidaĵo: marmoraj fontanoj disĵetas brilegajn pluvetojn; ĝoje kantante, multaj birdetoj flugas de branĉoj al branĉoj.

Pli malproksime, ĉirkaŭita per densa hederaro, aperas imponanta kastelego — kaj ĉiam ni daŭrigas nian senfinan iradon.

Ĉiuj pordoj malfermiĝas per mia mirakla ŝlosileto, neniam estas kontraŭstaranta. — Tiel mi intersekve trapasis ĉiujn landojn: la belegajn pejzaĝojn de la riĉa Germanujo, la vastegajn kamparojn de la spacaj Rusujoj, Ĥinujon, Japanujon, kaj la Amerikan landaron, por reveni tra Anglujo. Ne ĉie mi vidis elmontraĵojn de ameco kaj frateco; disputoj kaj militadoj disigis la homojn; ĉu estis ĉiam tiel gravaj, ne-traireblaj profundaĵoj, kiujn neniu ponto povus unuigi? Ne

ĉiam; ofte nur ne sufiĉe klaraj statoj, malkomprenitaj sciigoj, neguste transdonitaj, kaj pli kaj pli aliigitaj per intersekvaj tradukoj sufiĉis por ekflamigi popolojn kiel per bombeksplodo.

Mi vidis la komercon kaj industrion nebligatajn per la diverseco de lingvoj, mi vidis milionojn da homoj vane klopodantaj por malfermi la serurojn de la fortikaj disigiloj ĉe la multnombraj landlimoj, kaj mi, dank' al mia malgranda ŝlosileto, mi bezonis apenaŭ tuŝi la pordojn por tuj ĉien eniri, kaj ĉie mi estis akceptata egale ĝentile, kaj ĉiuj min konsideris kiel longdatan konaton. — Post tio ĉi mi havis nur unu deziron: danki la feinon pro ŝia multpoviganta donaco; mia bonvola kondukanteto, konsentante plenumi mian peton, alvokas per speciala signalo, du dresitajn cignojn; tuj ili nin kumprenas sur siaj dolĉaj dorsoj, kaj malmulte poste, mi estas feliĉa, revidi ilian ĉarman estrinon, la ĉielan feinon; melankolie kuŝante sur velura kanapo, malĝoje ŝi revadas; je mia alveno ŝi ekstarigas, kaj estas tre kortuŝata per mia dank-emo; du larvoj pro kontenteco malsekiĝas ŝiajn palajn vangojn, kaj iomete rekuraĝiginte, ŝi tiel ekparolas: — « Ĉu ĉia espero ne estus ankoraŭ vana, kaj estus eble, ke iam mia dezirego plunumiĝu? Mi celas ja nur feliĉon por la tuta teranaro, sed la homoj estas malfidemaj, kaj malakceptas miajn bonfarojn. Ĉiutage, po miloj, mi disĵetas ŝlosiletojn, kies kvalitojn vi ŝatas tiel ĝentilege, kaj preskaŭ ĉiuj kestetoj revenas, ne malfermitaj. Mi rezervis, diferencigante nek rangon, nek aĝon, al ĉiu homo, po unu kesteto, kaj, ho ve, mi posedas ĝis nun, preskaŭ tiom da kestetoj, kiom mi preparigis.

Kvankam mi bonege konsciis la ĉagrenon de mia bela bonfarantino, mi trovis nenian vorton por ŝin konsoli; la fakto estis verega, tio estas fatalo de ĉia noveco. — Kaj mi silentis.

Diru, amiko, ĉu vi ne deziras oran ŝlosileton? Aŭ ĉu vi dubus pri tio, ke nia kara lingvo estas tiel multvalora ora ŝlosileto?

*Fantaziaĵo de Eugénie Gunzburg
el Antverpeno (Belgujo).*